

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44000 NANTES, Francujo

JARABONO

Jarabono : 65 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1986 - 4


(OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... La Historio de la Libro.



Kaj, la dolmeno apud Grésillon.

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO


	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
Kial dolmeno en Baugé?(R.Martin)	3-4
La historio de la libro	5-6
Psikologio kaj Esperanto (J. Saheb-Zamani)	7-8
Paĝo de la geknaboj (Marina)	9
Nokto blanka de husaro ruĝa (A.Allais-tr. L. Beau)	10-11
Por via distro (C. Cavalié)	12
La vie de Gresillon	13-14

El Grésillon

La "ĉiuj-ĉiu" ludo

" La Kultura Esperanto-Domo Gresillon estas la domo de ĉiuj." Tion ni diras, ripetas, ĉar ni ŝatas, ke estas tiel. Ni ĝojas, kiam ni aŭdas de amiko la vortojn: " nia kastelo". Tio pruvas, ke li aŭ ŝi sentas sin hejme en Gresillon kaj tion ni celas. Tio signifas, ke ĉiu rajtas uzi la materialon disponigitan al ĉiuj, se tio ne ĝenas iun. Sed tio ankaŭ signifas- ĉiuj el vi senescepte konsentos- ke la uzinto lasos tiun materialon surloke, en bona stato, por la uzado de ĉiu alia. Tiun simplan regulon de la socia komuna vivo la ĉeestantoj respektas dum la staĝoj. Almenaŭ preskaŭ ĉiuj. Sed, kiam Gresillon fermis siajn pordojn?

Tiam la regulo ne ŝanĝiĝas kaj daŭre validas, aŭtune, vintre, printempe por la parko, kie samideanoj de la regiono kelkfoje venas, tute prave, por promeni kun amikoj. Sed okazas, ke, tre escepte, esperantistaj promenantoj vidas fruktojn kaj pensas, ke ili fariĝis ĉies proprajo. Kaj jen gramatika dramo! Ĉu "ĉies" signifas "de ĉiuj" aŭ "de ĉiu aparte"? Ŝajne okazas,ke la vorteto alprenas la duan signifon. Tre escepte, kompreneble. Fruktoj, kies destino estas fariĝi ĉiesa proprajo, sub iu formo, kiam denove la kastelo, malfermita, apartenos al ĉiuj...komune, iĝas "iesa". Bedaŭrinde! Sed tre escepte, kompreneble.



FELIĈON por vi,

PACON por la mondo,

SUKCESON por Esperanto

deziras Kulturaj Kajeroj okaze de la CENTJARA DATREVENO DE ESPERANTO.

Esperanto tra la Mondo

POST LA PEKINA KONGRESO- Nova UEA-estraro estis elektita dum la universala kongreso. S-ro Humphrey Tonkin estis elektita, kiel nova prezidanto. S-ro Yosimi Umeda estos vic-prezidanto. S-ro Texier (Francio) estas estrarano pri interna agado.

Tri ĉinoj enviciĝis inter la prelegantoj de la Internacia Kongreso-Universitato.

La kongreso estis la okazo de la esperanta debuto de la konata kanada stelo de la kanto Joëlle Rabu. Ŝi esperas kanti tute en esperanto ankaŭ dum la jubilea kongreso de Varsovio.

La kongresanoj multe ŝatis belajn tipe ĉinajn spektaklojn, dum la nacia vespero, la internacia arta vespero kaj la folklora vespero (Sur la Silka Vojo).

LA JUNULARA KONGRESO- 105 partoprenantoj el 20 landoj ĝuis la agrablan etoson de la Internacia Junulara Kongreso en Neŭrim (Israelo), de la 14-a ĝis la 21-a de aŭgusto.

S.A.T. KONGRESIS EN HISPANIO ...

KAJ JUBILEOS EN BOULOGNE SUR MARO-

La 59-a S.A.T.-kongreso okazis apud Barcelono, en Sant Cugat del Vallès. Jam 52 jaroj forpasis post la antaŭa kongreso de la asocio en tiu lando (1934, en Valencio) La tiea kongreso ricevis bonan subtenon de diversaj institucioj. Krom la ekskursoj kaj vesperoj, estis interesaj prelegoj, notinde pri la hispana revolucio de 1936.

En 1987 la S.A.T.-kongreso okazos de la 22-a ĝis la 29-a de aŭgusto en Bulonjo ĉe Maro, kie okazis la unua Universala Kongreso en 1905.

LA PUPTEATRA FESTIVALO- La 19-a Internacia Pupteatra Festivalo okazis en Zagrebo, de la 23-a ĝis la 31a de aŭgusto. Sep spektakloj de ses trupoj estis prezentitaj en esperanto.

La estonta festivalo estos aranĝita en Zagrebo kaj aliaj jugoslaviaj urboj de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto 1987.

SCIENCA KAJ TEKNIKA KONFERENCO EN ĈINIO- Kiel preludo de la Universala Kongreso, la Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en esperanto komenciĝis en la pekina Lingva Instituto la 22-an de julio. Ĝi arigis 238 ĉinojn kaj 52 alilandajn sciencistojn kaj teknikistojn, kvankam en la inaŭguro la nombro da ĉeestantoj superis 500 ! Tiu inaŭguro komenciĝis per la salutvortoj de Yan Dongsheng, vicprezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj.

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ-

De la 6-a ĝis la 18-a de julio 1987 okazos la nova sesio de la Someraj Universitataj Kursoj en esperanto aranĝitaj de la universitato de Lieĝo (Belgio). La temoj estos lingvistiko, stereografio kaj ekologio Informas: Sekretariato de SUK, José Jacobs, B.P. 62 Liège X (Belgio).

FOIRA FORUMO EN LEIPZIG- Ĝi okazos de la 13-a ĝis la 15-a de marto. Debatoj pri:" Cent jaroj de esperanto, lingvo por scienco, tekniko kaj kulturo ". Informas: Kulturligo de GDR, IFER 87, K. Kollwitzstr.115, Leipzig.

BELA AFISO HAVEBLA EN HISPANIO-

La hispana ministerio de Transportado, Komunikado kaj Turismo eldonis grandan kolorafiŝon pri la hispana esperanto-kongreso 1987. La bildo prezentas skizon de detalo de la fama pentraĵo de Velasquez " Las meninas ". Vi povas peti ekzempleron de la 47-a Hispana Kongreso de Esperanto, strato Atocha 98, 4, 28012 Madrid.

SKIADO EN JUGOSLAVIO- La 28-a Internacia Fervojista Esperanto Skisemajno havos lokon en Sarajevo, de la 23-a ĝis la 28-a de februaro. Informas Esperanto, 28 IFES, v. Pelagiĉa 8/1, YU-41000 Sarajevo.

ESPERANTISTOJ EN AFRIKO- Petas rilatojn kaj studmaterialon: Esperanto Klubo de Dakar. Adreso: Alphonse Diatta, Villa 218, HLM Fass, Dakar, Senegalo.

Kial Dolmeno en Baugé ?


La vorto "dolmeno" signifas ŝtonotablo. Ĝi estas farita el du keltaj radikoj: "dol"=tablo kaj "men"=ŝtono. Laŭ la kelta sintakso oni devas kompreni ne "tabloŝtono" sed, kiel antaŭe dirite, "ŝtonotablo". Kaj tuj mi devas detrui eraron; oni ĝenerale kredas, ke, ĉar la nomo estas keltdevena, ankaŭ la aĵo tiel nomata estas kelta. Sed la dolmenoj apartenas al antaŭkelta periodo, same kiel la pli granda parto el la megalitoj. Oni trovas ilin tie, kie neniam la keltaj triboj vivis, kaj oni precize kalkulis, ke ili estis starigitaj antaŭ la alveno de la keltoj. Kial do oni nomis ilin tiel ?

Oni nomis ilin tiel, unue ĉar oni erare pensis, ke ili estis starigitaj de keltaj triboj, due, ĉar ili estas grandamase troveblaj en Bretonio kaj en aliaj okcident-eŭropaj landoj, kie vivis keltoj; sed la du faktoj estas sendependaj. La vorto "dolmen" estis kreita nur dum la dekoka jarcento de kelkaj personoj, kies keltaj sentoj estis pli ol ordinare grandaj.

Ĝis nun mi parolis nur negative. Sed tri problemoj aperas koncerne la dolmenojn: Kiam kaj de kiuj? Kiel ? Kial ? Ni pritraktu la unuan problemon.

Ni nun scias, ke la Indo-eŭropaj grupoj kaj triboj ne estis la unuaj okupantoj de Eŭropo. Antaŭ ili aliaj grupoj ekzistis tri mil aŭ kvar mil jarojn antaŭ Kristo. Kiam la unuaj keltaj triboj alvenis al Okcident-Eŭropo ili trovis ĝin en stato de megalita civilizacio de Svedio ĝis Portugalio. Tiu megalita civilizacio ekzistis ne nur en Eŭropo sed ankaŭ en Azio. Eble tiu ekstreme grava fakto, tiu impona fenomeno nomata religio, naskiĝis inter la megalitaj popoloj. Je tri mil jaroj antaŭ Kristo tiuj popoloj kreis unu el la plej maljunaj skribaj lingvoj: la kuneiforman. Jen do la respondo al la unua demando: la dolmeno en Baugé verŝajne estis starigita de triboj antaŭ la kreado de skriba lingvo, tio estas proksimume tri mil kvin cent jarojn antaŭ Kristo, ĉar poste ili estus skribintaj, se ne kompletajn frazojn, almenaŭ kelkajn "vortojn" sur tiuj megalitoj.

La dua problemo estas: Kiel? Kiel tiuj primitivaj homoj povis transporti tiel pezajn ŝtonegojn, kiel, ekzemple, estas tiuj troveblaj apud Rennes ĉe la Roche aux Fées (la Roko de la feinoj). Keltaj ŝtonegoj pezas proksimume 40 aŭ 50 tunojn, kaj oni scias, laŭ la naturo de la ŝtonoj, ke la plej proksima loko, kie ili estas troveblaj, kuŝas ĝis distanco de 4 - 5 kilometroj ! Ĉar neniu el ni ĉeestis iun ajn megalitan kongreson, ni povas nur imagi la metodon: oni verŝajne uzis grandan amason da homoj puŝantaj aŭ tirantaj la ŝtonegojn metitajn sur arbo-trunkoj. Oni puŝis, metante arbo-trunkojn sur la vojon, antaŭen, deprenante la arbo-trunkojn de sur la vojo, malantaŭ la ŝtonoj, kaj metante ilin sur la vojon, antaŭen laŭ la sekvantaj desegnaĵoj:



Nun pri la tria demando: Kial?

La rolo de la megalitaj triboj estis gravega en Azio. Ili fakte estis la pioniroj de civilizacio, de religiaj praktikadoj, de magio. La du fundamentaj pilieroj de iu ajn civilizacio fakte estis religio kaj magio, laŭ la du fundamentaj tendencoj en homoj antaŭ la ekzistado de scienco kaj de sciencaj esploradoj kaj klarigoj. religio estas respondo al la problemoj: kiel regi bridi, superforti la eksterhomajn tutpotencajn fortojn de la naturo

Tiuj ĝeneralaj faktoj helpos nin nun pli bone kompreni la signifon de la megalitoj. Ili estis konstruaĵoj religiaj aŭ magiaj, ĉar oni devas scii, ke la magio naskiĝis longatempe antaŭ la historiaj periodoj de antikvaj Greklando kaj Romio, sendube en Kaldeo. Tiu arto, kiu pretendis kunligi homojn kaj naturajn fenomenojn povas esti konsiderata, kiel praktika religio, al kiu oni devas rilatigi kuracarton kaj astrologion. La disvastiĝo de magio povas esti klarigita per la historio de la megalitaj triboj. La diversaj popoloj, kiuj ankoraŭ hodiaŭ loĝas en la nordaj partoj de Eŭropo kaj Azio apartenas, laŭ sia lingvistika unueco, al granda popolo, kiu iam okupadis larĝegan teritorion antaŭ la arjaj grupoj. Mi ĵus parolis pri lingvistika unueco. Mi tiel taŭge povas paroli pri ilia religia unueco. Malgraŭ suprajaj diferencoj, magiaj praktikadoj estis ĉiam pli malpli similaj. Legu la grandan nacian eposon de la Finnoj "Kalevala" verse tradukita en Esperanto, kaj vi pli bone komprenos tion, kion mi volas diri: kulto de spiritoj, de la kvar elementoj kaj de la Naturo ĝenerale.

La megalitoj, kies rolo estis religia, magia, estis uzitaj ne nur kiel tombejoj sed ankaŭ kiel kvazaŭ-preĝejoj. Kiam la keltoj alvenis, ili trovis popolojn organizitajn en triboj kaj en diversaj megalitaj religioj. La keltoj fakte ne konstruis tiujn primitivajn monumentojn, ĉar ilia religio malpermesis tion al ili. La Druidoj malpermesis la konstruadon de temploj kaj ankaŭ la reprezentadon de Diaĵoj. Druida filozofio estas tre malbone konata, ĉar skriban lingvon ili ankoraŭ ne posedis. Ĉio estis memorigita parkere. Kun ili komenciĝis kaj prosperis la kulto de bestoj. Unue, oni ne rajtis manĝi ilin, ĉar ili estis konsideritaj kiel diaĵoj: leporoj, anseroj, kokinoj kaj kokoj estis nemanĝeblaj. Kaj, laŭ la kutimo ĉe primitivaj religioj, io malpermesata estis poste ege rekomendata laŭ alia nova ideo: kiu deziras ricevi la kvalitojn reprezentitajn de la bestoj, tiu nepre manĝu ilin, kiel kuracilon aŭ magiilon!

Tiuj primitivaj kutimoj ne povis esti detruitaj de la sekvintaj religioj, kiuj konsekvence preferis gardi kaj adapti la antikvajn kredojn por konservi la plej grandan nombron da fideluloj. Kiam Kristanismo aperis, speciale en Bretonio, anstataŭ konstrui krucon apud megalitoj oni metis ĝin sur la kultindan ŝtonegon. Kaj oni akceptis kokojn sur niaj preĝejoj. Kokoj estis respektataj, ĉar oni kredis, ke ili helpis forpeli fulmobatojn. Kaj nun ? Ĉar ni travivas sciencan epokon, ni povas vidi, sur niaj preĝejoj krucon, kokon kaj fulmoŝirmilon!

Robert MARTIN

ALVOKO - La Esperanto-Domo Gresillon bezonas: 1) por la Printempa Periodo (19/25-4) la helpon de junul(in)o por la prizorgado kelkhora ĉiutage de geknaboj: promenadoj, ludoj,...

2) por la Somero (15/6-30/8)

a- la helpon de gvidantoj pri artaj manlaboroj;

b- junul(in)ojn por la prizorgado de infanoj dum la ĉeesto de la gepatroj en kurso-ĉambroj, kaj/aŭ organizado de promenadoj kaj ludoj por plenkreskuloj. Laboro kelkhora ĉiutage.

Sendu informpetojn kaj proponojn: Esperanto-Domo; Gresillon,F-49150 BAUGE

LA HISTORIO DE LA LIBRO

Malgraŭ la ekzisto de multaj modernaj eltrovaĵoj, la libro restas unu el la ĉefaj disvastigiloj de la ideoj. Kiam nuna lernanto ĝuas ne nur latekston sed ankaŭ la ilustraĵojn de unu el tiuj mirindaĵoj, la lernolibroj, li ne pensas, ke, plurajn jarcentojn antaŭ Kristo, li tute ne estus lernanto aŭ estus devigata kunporti dekojn da kilogramoj da ŝtonlibroj!

La unuaj libropaĝoj estis la muroj de la kavernoj, en kiuj loĝis niaj prapatroj. La desegnaĵoj tie faritaj ankoraŭ nun mirigas la rigardantojn. Poste, kiam la homoj ne plu esprimis siajn dezirojn per desegnaĵoj sed per signoj, literoj, oni uzis kuiritajn terplatojn kiujn oni retrovis en templaj veraj bibliotekoj en Proksima Oriento. Tio montras, ke dum tre longa tempo la skribarto estis speco de sekreta scienco rezervita al la kredantoj de la primitivaj religioj. Sur tiuj terplatoj estis skribitaj longaj poemoj kaj legendoj, misrakontoj de veraj okazaĵoj. Sed la neceso transporti aŭ dissendi la tekstojn devigis la poetojn trovi sufiĉe moveblajn materiojn. Post la ŝtonoj kaj brikoj, oni uzis tabuletojn el eburo surŝmiritajn per vakso. Per speciala pinta ilo oni skribis sur la vaksa tavolo. Sed la tekstoj tiel skribitaj estis nedaŭraj. La gravajn tekstojn, la leĝojn oni daŭre skribis sur ŝtono kaj bronzo. La malkovro de la papiruso fare de la Egiptoj estis grandega okazaĵo. La papiruso estis membraneca ŝelo de iu kano, kiu rolis kiel la nuna papero. La Romanoj same uzis la baston de kelkaj arboj: tilioj, aceroj, platanoj. El ĝi ili faris longajn volvaĵojn aŭ kunigis la surskribitajn foliojn kaj ilin kunkudris. De la latina vorto "liber", basto de arbo, devenas la vorto libro. Ĉar baldaŭ necesis havi plurajn ekzemplerojn de la sama teksto, la aŭtoroj havis plurajn kopiistojn kaj diktis al ili la skribotan tekston.

Romio, per kontakto kun la venkitaj grekaj popoloj, estis iom post iom venkita siavice de la greka kulturo. La greka subtileco traboris la kirasojn de la brutalaj venkintoj. La infanoj de Romulus kaj Remus alportis al Romo la bibliotekojn de Grekujo. Ekzistis grandaj bibliotekoj ankaŭ en aliaj landoj, ĉefe en Aleksandrio. Bedaŭrinde obskurantismo malaperigis multajn manuskriptojn. Nenio restus el la klasikaj verkoj, kiuj nutris la modernan penson, se monaĥoj, tute izolitaj en siaj fortikigitaj monaĥejoj, ne estus kopiintaj kaj tradukintaj la verkojn ŝparitajn de la militistoj. En tiu epoko oni jam forlasis la papiruson kaj uzis pergamenon, t.e. felon de ŝafo speciale preparitan por skribado. Sed tiuj feloj estis tre multekostaj. Ne ĉiuj monaĥoj estis kleruloj kaj kelkaj forskrapis la skribaĵojn de siaj antaŭuloj por reutiligi la malnovajn felojn. Feliĉe niaj modernaj rimedoj ebligas la reaperigon de forskrapitaj linioj; tiu laboro estas nomita "dečifro de palimpsestoj"

La historio de la libro stagnis ĝis la invento de la presado. La papero jam ekzistis. La Ĉinoj fabrikis ĝin el miksaĵo de boligitaj fibroj de morusarbo kaj bambuo. La unua paperfabriko estis starigita en Samarkand fare de ĉinaj malliberuloj. La Araboj de Nord-Afriko iom poste fabrikis paperon el ĉifonoj.

La invento de presado per moveblaj literoj pligrandigis la bezonon pri papero. En Francujo la Protestantoj specialiĝis pri tiu fabrikado. Sed pro la nuligo de la Nantes-edikto ili formigris al Nederlando kaj tie restarigis siajn fabrikojn.

La elpenso de presarto estis la ekirpunkto de la scienca progresado Sen la presado ni ne havus la eblecon multigi la librojn kaj vendi ilin je iom malalta prezo; sen disvastigo de la libroj neniu lernado estus ebla; ni povas diri, ke la elpenso de presado estis tiel grava, kiel

la eltrovo de elektro kaj de la atom-potenco. De tiu tempo la mondo rapide evoluis. La gravurarto permesis tipografion. La tabulpresado anstataŭis la mandesegnadon. Gi konsistis en reliefa gravurado de tekstoj kaj desegnoj sur ligna tabulo. Tiel estis ebla la reproduktado de pluraj ekzempleroj sed nur sur unu flanko de folio. La laboro estis tre longa kaj la libroj grandaj kaj dikaj. Dank'al Gutenberg ili fariĝis pli malgrandaj kaj pli maldikaj. Iom post iom presarto disvastiĝis en tuta Eŭropo. Multaj eŭropaj urboj havis siajn presejojn. Pluraj tipografoj famiĝis pro siaj rimarkindaj eldonaĵoj. Kelkaj havis malfacilaĵojn pro religiaj aŭ politikaj kaŭzoj. La franca eldonisto Etienne Dollet estis kondamnita je morto, pardonita, denove arestita kaj fine bruligita en 1546.

Sed la homa penso estas nevenkebla Spite la turmentadojn la presistoj ne ĉesigis sian laboron. La sekretaj eldonaĵoj multiĝis. La libereco de presado aperis, malaperis, reaperis pli malpli limigita laŭ la reĝimoj.

Dum la primitiva epoko teksto kaj ilustraĵo estis skulptitaj reliefe sur ligna tabulo. Post Gutenberg oni serĉis rimedojn por fari ilustritajn librojn. Oni utiligis la ligno-gravuradon. Oni eldonis sciencajn verkojn ĉefe pri ĥirurgio kun ilustraĵoj en 1497. Grüninger gravuris figurojn sur apartaj lignopecoj kaj poste kunigis ilin laŭ diversaj aranĝoj. La reliefa metalgravurado anstataŭis la ligno-gravuradon sed nur dum kelka tempo. Dürer en la 16-a jarcento sukcesis redoni la aspekton de la plumdesegno. Fine de la 18-a jarcento Senefelder elpensis litografion, kiu konsistas en desegnado per specialaj kolorigiloj sur glata ŝtono. Acido korodas la ŝtonon krom la partoj kovritaj per la kolorigilo. Tiamaniere oni havas reliefan provaĵon. La elpenso de la fotoarto progresigis la aferon. La rimedoj pli kaj pli perfektiĝis kaj nun oni povas teni en la manoj vere mirindajn presaĵojn. Oni pli kaj pli uzas la ilustradon; ĝi kelkfoje anstataŭas la tekston. Kuraĝige estas konstati, ke aperas multaj valoraj libroj. Ĉu la esperanto eldonejoj baldaŭ represos elĉerpaĵojn?

****

EN FRANCIO

LA NOVA STUDRESTADEJO "LA KVINPETALO"- Tiu nova studrestadejo, Bouresse, departemento Vienne, Francio, publikigis sian programon por 1987. La oficiala inaŭguro de "La Kvinpetalo" okazos en Poitiers, de la 1-a ĝis la 3-a de majo, kun literatura forumo pri la temo "Krimo kaj fantasto en la esperanta literaturo".

En la studrestadejo estas antaŭvidataj diversaj staĝoj de la 21a ĝis la 25-a de aprilo (preparo de pedagogia atesto), kaj de la 10-a de julio ĝis la 16-a de septembro Skribi al: Societo Yvonne Martinot, S. Bourot, route de Civaux, F-86410 Bouresse.

PEDAGOGIA SEMINARIO- UFE, 4bis rue de la Cerisaie, 75004-Paris, aranĝos dum Pasko 1987 la duan pedagogian seminarion, pri instruado de esperanto al lernantoj en lernejoj.

LASTATEMPE APERIS

Nia amiko André Cherpillod aperigis tri tre interesajn librojn:

" Akada (asirobabilona) Leksikono" kun la parencaj vortoj hebreaj, siriakaj, arabaj, ktp, kaj la etimologiaj rilatoj kun Esperanto. Publika prezo: 22 frankoj, por la asocioj:15f.

" Ĵana d'Arko ĉe la ŝtiparo" de Paul Claudel. Originala franca teksto. Esperanta traduko kaj notoj. Publika prezo: 60 f. Por la asocioj:40f

""La mortinta reĝino" de Henry de Montherlant, dramo en tri aktoj. Esperanta traduko. Publika prezo:60f. Por la asocioj: 40f. Mendeblaj ĉe André Cherpillod, 11 rue Gounod, 92000 Nanterre.

PSIKOLOGIO KAJ ESPERANTO

La unua demando tiurilate estas: ĉu Esperanto havas pozitivan influon aŭ efikon sur la personeco de ĝiaj parolantoj, speciale sur la infanoj, kiuj denaske lernas ĝin ? La respondo, laŭ psika vidpunkto, estas definitive "jes". Kial ?

Rilate Esperanton kaj psikologion oni malkovras ion grandiozan pri psikofiziko, pri kiu, ĝis nun, nek psikologoj nek fizikistoj trovis kontentigan respondon. Kiam oni parolas, aŭ pli bone, kiam oni diras siajn pensojn per vortoj, oni transformas ian psikan kaj neparolan energion al ia parola aŭ buŝa energio. Tiu ĉi konstanta transformado de energio estas la komuna temo inter psikologio, fiziko kaj lingvistiko.

Nu, oni pensu kiom da funkcioj aŭ ŝlosiloj bezonas la cerbo por elfari tiun transformon. Do, tiam, oni tuŝas la interrilaton de la menskapableco kaj la nombro de la gramatikaj reguloj de la lingvoj. En ĉiuj tiel nomitaj ne-artefaritaj lingvoj, ĉiuj reguloj estas funkcibutonoj de tiu transformiga aparato de la cerbo: transformi ne-parolan energion al verba energio. Kaj ĉi tie venas la grava demando: la regulojn de kiuj lingvoj oni povas modeligi, kiel la plej bonaj por tiu komputero, la homa cerbo ? Ĉu tiujn de la sanskrita, kiuj estas 4000, ĉu tiuj de multaj aliaj, kiuj pli malpli estas 2500 ?

Esperanto, efektive, donas al ni la modelon aŭ la matricon de la minimuma nombro de la respektivaj butonoj por tiu ĉi transformado. Laŭ Esperanto-fundamento, la homa menso bezonas nur 16 principajn kaj 100 ne-principajn regulojn aŭ butonojn por fari tiun transformadon. Tiu ĉi malkovro estas unu el la plej gravaj en la historio de la scienco, kies multnombraj dimensioj restas ankoraŭ ne-pristuditaj. Kaj ĝuste de ĉi-tie komenciĝas la rilato deEsperanto-komputeroj kaj la teknologio de la tradukmaŝinoj. Oni ja povas trovi multon ĉi-rilate en "Computer Weekly" kaj en la esploroj de Prof. Bruce, usona samideano de la universitato de Illinois. Do, se vi jam aŭdis, aŭ aŭdos, ke Esperanto estas la plej amata lingvo de la komputeroj, vi ne tro miru !

Alia interrilato de psikologio kaj Esperanto estas la "korektada periodo" en infanaĝoj. Ĉiuj infanoj, sen escepte, kiam ili komencas paroli, havas tre malfacilan, eĉ dolorigan, periodon, kiun oni povas nomi la periodon de "ne tiel sed tiel". Tio signifas ke, kiam infano aŭdas kaj lernas orele la gepatran lingvon, li kutime, post nelonge, faras kaj eldiras vortojn, kaj konstruas frazojn, kiuj, kvankam tute logikaj kaj kompreneblaj, tamen ne estas akcepteblaj, ĉar ili ne estas tiel, kiel la plenkreskuloj uzas ilin, nelogike kaj ofte tute senracie. Do, infanoj devas atendi dum jaroj, lerni kaj aŭskulti, kiel la aliaj uzas la lingvon, por ke ili povu parkere utiligi ĝin. Tiel la "korektada periodo", por la simpla kaj logikema menso de infano estas ĝuste la batalperiodo de kontraŭlogiko kontraŭ logiko. Kaj ĉiuj bone scias, ke ĝi restas fine, la vivdaŭra interbatalo, kie la venkinto ĉiam estas la kontraŭlogiko. Ĉar ĉiuj ne-artefaritaj lingvoj estas la plej belaj simboloj de kontraŭlogiko. Malfeliĉe, tiu interbatalo neniam ĉesas kaj ĝi restas ĝis la morto, kiu feliĉe liberigos nin de tiu eterna problemo de la lingvoj.

El la vidpunkto de psikologio, la "korektada periodo" ĉesas nur tiam, kiam la menso de la homo estas je la dispono de kontraŭlogiko. Alidire, post la venko de imito super kreeco, la rego de aŭdaĵoj super menskreaĵoj, nur por akordiĝi kun la kutima eraro de la respektivaj socioj. Kiom perdiĝas de la personeco, kiu tiel restas kaŝita ? Kaj la kialo de tiu ĉi manko estas memevidenta: ĝis nun ekzistis neniu socio kun logika lingvo. Sed poste, kiam oni dolorige akceptis kontraŭlogikon, oni klopodas denove lerni logikon kaj logikan pens-manieron, ĉar oni devas lerni kaj matematikon kaj logikon. Ĉu ne ridige ?

Ĉu oni iam pensos kaj serioze studos, kiel negativan efikon havas en la ekfloro de la personeco tiu fundamenta instruo de kontraŭeco en la komenco de la vivo kaj mens-kreskado ? Laŭ mi, tia instruado certe multobligas la neracian pens-manieron ĉe la homo, kiun ni ĉiumomente konstatas dum nia vivo.

Tharnidike, la fama usona psikologo malkovris en 1922 ion novan pri la instruado de lingvoj. Lia fako estis psikologio kaj lingvo. La rezulto montris, ke Esperanto estas dekoble pli facile lernebla ol ĉiuj aliaj lingvoj. Li pruvis, ke Esperanto-lernantoj ne suferas, ne kadukiĝas pro la lernado, kion kaŭzas aliaj lingvoj; kaj ke psike ili eĉ ĝojas, ĉar ili samtempe kredas, ke ĉiuj aliaj homoj pli malpli egale uzas energion por lerni ĝin, pro tio ke ĝi apartenas al neniu nacio. Do, Esperanto, por la unua fojo, donas la eblecon al psikologoj esplori tion, kio povas esti la diferenco de la personeco de tiuj, kiuj denaske estas esperantistoj, kaj kreas mense pere de iu logika lingvo, kaj tiu de alilingvanoj. De Freud ni scias tutcerte, ke 9/10 de la mensaktiveco estas senkonscia kaj ankaŭ ne logika. Kaj de Aristotelo ni scias, ke la interrilato inter parolo kaj penso estas senduba. Sed oni ankoraŭ tute ne scias ĉu estas la menso, kiu kaŭzas la mallogikecon de lingvo, aŭ ĉu estas la lingvo, kiu helpas ĝin. Ĉiuokaze Esperanto donas al ni la eblecon malkovri tion, kaj eble multaj konsentas kun mi por diri, ke la homa socio bezonas pli multajn homojn, kiuj pensas kaj agas logike.

Alia psika demando estas, ĉu entute, kiam temas pri la plej superaj mensaktiveco, oni povas pensi libere, senhelpe de lingvo ? Tiun ĉi demandon eble komprenas homoj, kiuj scipovas pli ol unu lingvon. Sed respondi, eble neniu ankoraŭ povas. En tiuj mensostatoj oni vere ne scias ĉu estas la penso, kiu venas antaŭ la vortoj, aŭ ĉu estas la vortoj, kiuj sinsekve venigas la pensojn.

Krom la aspektoj de la lingva diskriminacio, kiujn ĉiu bone konas, ekzistas alia psike, ekonomie kaj ĉiurilate malbona aspekto, kiu estas la kaŭzo de multaj aliaj problemoj: la studentoj de la tiel nomitaj tria-mondo-landoj bezonas lerni aliajn lingvojn. Ili memkompren-eble "elspezas" pli da energio kaj mono por elstariĝi en siaj fakoj. Tio malkovras la gravan problemon de la nesufiĉe rapida transigo de la scienco en la trian mondon. Ili pro tio restas ĉiam minimume 6 aŭ 7 jarojn malantaŭ la samkvalitaj studentoj de aliaj landoj. Kaj oni ne forgesu la sekvajn psikajn efikojn kaj malegalecojn.

Por solvi la problemojn, maljust-econ, malriĉecon, nescion, malsanon, la kvar talismanojn de mizero, oni bezonas la tutan homforton, sed oni plie devas elspezi nekred-eblajn sumojn kaj valoregan tempon nur por lerni la lingvojn. Espereble la sperto de Irano kaj aliaj evolu-landanoj pri Esperanto povos pripens-igi la funkciulojn. Tiom da interesiĝo pri Esperanto en nia lando kaj, espereble, post nelonge ankaŭ en multaj aliaj landoj, tutcerte utilos por ŝanĝi la cirkonstancojn rilate Esperanton.

G. ZAHEB ZAMANI

(Laŭ prelego prezentita en Grezijono en julio 1978)


PAĜO DE LA GEKNABOJ

EVENTOPLENA REVENA DIMANĈO

La dimanĉon de la foriro, Marie-Thérèse, nia akompanantino, ellitiĝis je la sesa kaj kvarono, vekis Silvian kaj Karin, la du junajn Nederlandaninojn, sed forgesis iri vidi ĉu ŝia lernanto Jozefo estas vekiĝinta; do, mi iris anstataŭ ŝi. Post la matenmanĝo, iu dentisto, kiu estis en Grezijono, akompanis nin al la haltejo de la buso; li profitis la okazon por rigardi niajn dentojn. Je alveno en Saumur, Marie-Thérèse rigardas la trajnhorajn tabelojn kaj panikiĝas, ĉar ŝi ne vidas la forirhoron de nia trajno por atingi Pau-on je la programita horo. Ŝi iras al la deĵoranto por demandi lin; li respondas al ŝi, ke, pro speciala dimanĉa horaro, tiu trajno ne veturos. Paniko! kiel ni revenos hejmen ? La deĵoranto diras, ke tamen ekzistas alia trajno. Ni devas atendi proksimume du horojn kaj duono en Saumur. Ni iras "trinkejumi", por resti paciencaj. Sed mi tediĝas, mi volas iri promeni. Ni metas la pakaĵojn en la gardoŝrankon, Marie-Thérèse enŝovas la moneron sed la ŝlosilo ne turniĝas; ŝi iras vidi la deĵoranton (la saman!), kiu venas, kaj sukcesas turni ĝin . Kaj ni iras promeni.

Jen ni, denove en la stacidomo. La trajno alvenas, ni eniras. Marie-Thérèse iras serĉi sidlokojn... kaj tiam mi subite konstatas, ke ni forgesis sur la kajo la sakon kun la manĝaĵo! Mi diras tion al mia frato kaj ni komencas kvereli:" estas vi, kiu..." "Ne, estas vi..." Bedaŭrinda afero, ĉar kutime la sandviĉoj de Grezijono estas bongustaj; tio ŝiras la koron! Ĉar en St-Pierre-des-Corps ni atendas unu plian horon, ni profitas ĝin por, tamen, manĝi. Ni estas nun en trajno kun kupeoj; mi sidas apud la fenestro, kaj subite mi vidas ion venantan de la reloj kaj suprenirantan al la fino de la trajno., kaj mi aŭdas bruon de fenestro frakasiĝanta. Post kelkaj sekundoj Marie-Thérèse alvenas kaj demandas ĉu ni ne aŭdis eksplodon, ĉar la neceseja fenestro frakasiĝis. Ni iras vidi. En Angoulême multaj homoj atendas sur la kajo; dezirante konservi nian kupeon por ni solaj, ni, la tri gejunuloj, fermas la kurtenojn, kuŝiĝas sur la benkoj kaj ŝajnigas dormon. Iu timeme malfermas la pordon, sed, vidante nin, rezignas. Ni ekridas... Je alveno en Pau, surprizo: neĝo. Ni ne atendis tiun veteron, ĉar noktis kaj ni ne rigardis eksteren. Ni devas denove atendi, ĉar la aŭtomobilo de la gepatroj de Jozefo, kiu devas lin preni, ne funkcias. Finfine ni alvenas hejmen, proksimume je la 10-a vespere. Ni bezonis pli ol 13 horoj por veni de Baugé al Pau... Konklude, ne estas konsilate fari tiun vojaĝon dimanĉe!

Marina kaj aliaj
Pau-anoj



EL AŬSTRALIO

Denove mi skribos pri miaj elefantoj. Ĉu vi povas kredi, ke nun staras en kaj apud mia ŝranko pli ol 130 elefantoj? Kaj du bildoj de elefantoj pendas de la muro. Sur la ŝranko-supro staras eta ligna tablo; la piedojn oni ĉizis en formo de rostroj kaj kapoj de tri elefantoj. La supraĵo de la tablo estas ĉirkaŭ la grando de telero. Apud la tableto estas familio: blua elefantino, rozkolora kaj malvkolora elefantidoj. Ĉiuj krietas se oni premetas ilin. Jes, ili estas infan-ludiloj.Fine mi mencias tion, kio estas mia plej malgranda. Ĝi estas et-eta, kaj portas elefantestron, kiu estas...muso! Kaj elefanteto kaj muso havas grandegajn orelojn...

Onklino Jean

La nokto blanka de husaro ruĝa

Multajn fojojn mi demandis min, kial oni nomas "blankaj" tiujn noktojn, kiujn oni pasigas ekster sia lito. Mi ĵus pasigis unu el ili kaj mi ĝin trovis, ni diru, verda. Tio ne malhelpis mian pordiston, kiam mi revenis matene, saluti min kun moka rideto, kiu verŝajne signifis: "Ha! Ha! mia bonulo, oni estas sin amuzinta!" Kaj tamen!...Sed mi ne iru antaŭen tro rapide.

Unue, mi devas diri al vi, ke, de kelkaj tagoj, mi enamiĝis...Ne ĝis pereo!... sed tamen, mi estis iomete korkaptita. Ŝi estis malgranda blondulino, tre ĉarma, kies frunto estis kovrita per frizharetoj. Ĉiufoje, kiam mi pasis antaŭ ŝia domo, ŝi metis sin ĉe sia fenestro. Pasinte kaj repasinte multfoje mi ekkredis, ke ŝi estas rimarkinta min kaj mi ridetis al ŝi. Mi eĉ kredis - vi scias kiel naiva mi estas!- ke ŝi ridetas al mi. Erare! Pri tio mi ricevis absolutan certecon, sed, bedaŭrinde,tro malfrue.

Iam mi pensis:" Estas necese fari decidon!" Intertempe mi zorge informiĝis, ne tro montrante mian scivolemon. Ŝi estas edziniĝinta al sinjoro, malbona laŭ la publika diro, kiu estras gravan fabrikon de pafilegoj. La malbona sinjoro eliras el sia hejmo ĉiuvespere ĉirkaŭ la oka kaj revenas tre malfrue en la nokto. "Bone, mi diris al mi. Precize tion mi deziras!" Estis la karnavaltempo. Pro tiu festo mi estis invitita je maskobalo. Vi scias, ke mi estas tre sprita, kaj la amikoj diris al mi:" Havu kostumon ridindan." Matene mi vestas min, kiel husaro de Monako. Vi diros, ke ruĝaj husaroj ĉe Monako ne ekzistas, ke estas nenia husaro. Tion mi scias tiel bone, kiel vi. Sed ĉu kapricemo ne ĝustigas neĝustaĵojn ? Dum mi admiras min en la spegulo, mi pensas: "Nu, estas ja la okazo iri viziti mian blondulinon. Ŝi povos rifuzi nenion al ruĝa husaro tiel belaspekta." Vere mi estas belega, tiel vestita! Tute perfekte belega eĉ ! Mi vespermanĝas frue. Bona vespermanĝo kun nutraĵo altgusta por doni al mi fortojn, akompanata per vinoj ekscitantaj por doni al mi...senhontecon. Mi ĉirkaŭligas mian glavrimenon, ĉar mi havas glavon, kompreneble, kaj jen estas mi preta por la atako. Alveninte al la domo de mia amatino mi ekvidas ŝian edzon forirantan. Mi donas al li sufiĉe da tempo por malproksimiĝi, kaj mi supreniras la ŝtuparon, senbrue malgraŭ la spronoj, kiujn mi ne kutimis uzi kaj kiuj estas tre longaj ĉe la ruĝaj husaroj. Mi tiras la piedeton de malfeliĉa kapreolino, kiu plenumas la oficon de sonoril-tintigilo. Malpeza paŝo aŭdiĝas malantaŭ la pordo. La pordo malfermiĝas. Jen mia blondulineto! Mi diras al ŝi... Kion mi povis diri al ŝi. Vi scias, ke en tiaj momentoj oni diras, kio venas al la penso, sed kvin minutojn poste oni ne plu povas ripeti la parolojn. Sed, kion mi memoras estas, ke ŝi respondis al mi malŝate:" Ĉu vi estas freneza, sinjoro ? Mia edzo tuj revenos...Mi jam aŭdas lin." Kaj ŝi fermas la pordon kontraŭ mia nazo. Efektive iu supreniras la ŝtuparon per paŝo multpeza, paŝo teruriga de edzo senkompata. Kvankam mi estas ruĝa husaro, mi konfesas, ke mi ektremas. Vi diras al mi, ke estis tamen rimedo nekomplika por eskapi tian situacion: malsupreniri la ŝtuparon kaj foriri tutsimple. Sed, kiel rimarkis prave angla poeto, simplaj ideoj venas la lastaj. Mi pensis pri ĉio, krom simpla foriro. Momente mi havis la ideon eltiri mian glavon kaj atendi la edzon, kuraĝe." Tiu rimedo estas stulta kaj suspektigebla" mi diris al mi. Subite mi vidis malgrandan pordon, kiun mi ne antaŭe vidis ĉar ĝi estas marmorfarbita, kiel la tuta koridoro. Cetere, en tiaj momentoj oni ne malŝparas sian tempon. Mi malfermas la pordon kaj eniras la lokon ne demandante min, kien mi iras. Unu sekundon plian kaj mi renkontis la edzon. Mi aŭdaş grincon de ŝlosilo en seruro, pordon malfermatan, pordon fermatan - sendube la saman - kaj mi povas finfine libere enspiri...Nur tiam mi ĉirkaŭrigardas la lokon, kie mi trovis rifuĝejon. Neniam vi povus diveni la lokon, en kiun

mi estis enirinta. Vi ridetas... Vi do divenis ? Nu, jes, estis... "tie", en tiu loko, kie oni kutime restas izolite. Malrapide, senbrue, mi eklevas la pordfermilon, kaj puŝas la pordon. Ĝi malcedas. Mi puŝas forte...Ankoraŭ pli forte...kun energio superhoma. La pordo daŭre malcedas. Absolute kiel pordo, kiu havas gravajn motivojn ne malfermiĝi. Mi pensas:" Kulpas la malsekeco, kiu iom ŝveligis la lignon!" Mi trovas apogpunkton kontraŭ la...sidilo kaj...han! mi puŝas...Klopodo senfrukta! Ideo abomena trakuras mian cerbon: ĉu la edzo, ekvidinte min kaj diveninte miajn intencojn enfermis min, helpe de ekstera riglilo ? Kia situacio por ruĝa husaro! Kaj mi estas atendata ĉe maskobalo. Ne, ne! Estas neeble! Mi forpelas de mi tiun doloran penson. Tamen la pordo staras nemovebla, kiel ŝtonego. Konsterniĝinte, mi sidiĝas. Feliĉe, oni povas sidiĝi en tiuj lokoj!...Kaj mi atendas.... Ne eblas, ke oni ne venos liberigi min. Sed, ve! Neniu venas.

De la strato suprenvenas ĝis miaj oreloj gaja bruego de trumpetoj, de diversspecaj muzikiloj...Kaj, sed malĝojigaj, la sonadoj de iu murhorloĝo, kiu anoncas ĉiun kvaronhoron. La savonto atendata ne alvenas " Ĉu ĉiuj enloĝantoj englutis bismuton hodiaŭ ?"

De tempo al tempo, kun malespero korprema, mi ekstaras kaj streĉante mian energion, mi puŝas la pordon, puŝas...puŝadas. Vane. Bonkvalita pordo! Fine, elĉerpita, mi rifuzas la batalon. La tenilo de mia glavo eniras mian flankon. Mi ĝin kroĉas al la pordfermilo kaj endormiĝas... Dormo malkvieta, intermiksita je teruraj sonĝoj. La bruo de la strato ĉesas iom post iom. Oni aŭdas nur trumpetojn, kiuj obstiniĝas heroe en la malproksimo. Poste ankaŭ la trumpetistoj enlitiĝas, kiel la tuta homaro... Mi ekvekiĝas. Estas ja frumatene! Mi frotas miajn okulojn kaj mi rememoras ĉion. Mia sango de ruĝa husaro trakuras mian korpon. Kolerege mi malkroĉas mian glavon de sur la fermilo kaj mi tiras ĝin al mi...Mi ne kuraĝas diri la ceteron. Kia idioto mi estis! Duobla, triobla idioto! Centobla idioto! Milobla idioto!!! Mi estis pasiginta la tutan nokton puŝante la pordon. Sed ĝi malfermiĝis ...internen !...

Alphonse Allais

Noveleto tradukita de Leon Beau

Por plezurigi vin aŭ la aliajn


okaze de la finjaraj festoj

CENTJARDAŬRA
ESPERANTA KALENDARO

Eleganta sur via skribotablo
Praktika en la uzado
ebligas trovi iujn ajn datojn de la jaro 1900 ĝis la jaro 2000

dimensioj : 10,5 × 16 cm.

Prezo : 50,00 fr. fr.




POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO

La trovota malnova ĉina proverbo estas:" El bona fero oni devas ne fari najlojn kaj el bonaj homoj ne soldatojn."

NOVA ENIGMO

A	Precize.....
B	Akneo, ekzemo, impetigo, ktp .....
C	Magistratestr' .....
Ĉ	Senkolora likvo uzata por kolorigi .....
D	Reĝej' .....
E	Tenotaĵoj .....
F	Substanco en kiun oni enmetas drogon .....
G	Homidoj .....
Ĝ	Torento, pluvego (figura senco).....
H	Malkovrus per intuicio .....
Ĥ	Agrokulturiloj .....
I	Lumvermo .....
J	Kulpigito .....
Ĵ	Vidalvide al .....
K	Fariĝas lume .....
L	Klarigi ideon per ekzemploj .....
M	Tropika arbo kun aroma ligno .....
N	Stumpoj de registroj .....
O	Entenantaj riĉaĵojn .....
P	Havi tuj preta .....
R	Kiaj estas la orbitoj de la sunsistemaj planedoj.
S	Specio de gad' .....
Ŝ	Titolo de filmo konata de E-istoj .....
T	Kvalifikas ian kalkulon .....
U	Patkukoj .....
Ŭ	Polajn lancistojn .....
V	Rilataj al malfeliĉa Respubliko .....
Z	Senmovigi, daŭre restigi .....



C. Cavalié

LA VIE DE GRÉSILLON

Réunion du Conseil d'Administration du 19/10/86

La séance est ouverte à 9 h.30. Sont présents: Mmes Cheverry, Lenel, Vincent; MM. D. Babin, P. Babin, P. Chevalier, F. et H. Boyet, G. Lagrange, P. Métivier, G. Dairon. Se sont excusés: Mme Micard, MM. Bénistant, Bodereau, Le Magadure.

Le président présente le bilan des stages passés: 1ère Période (Printemps): la rencontre d'enfants n'a réuni que 40 personnes dont 20 enfants. Seulement deux jeunes étrangers ont pu participer: les dates de vacances dans les différents pays d'Europe sont très dissemblables. Pendant trois jours le Pedagogia Seminario de UFE n'a attiré qu'un groupe restreint. La Deuxième période (Juin), chaque année plus suivie (40 participants en 1986) a réuni 65% d'amis étrangers. Les 79 participants de la troisième période ont été satisfaits du programme culturel bien que quelques uns aient trouvé certaines conférences un peu longues. Malheureusement, seule une partie des stagiaires a participé à toute la période. La quatrième période a réuni 60 participants et la cinquième 40 grâce à des inscriptions tardives. Mais le cours d'Informatique a reçu très peu de visiteurs cette année. La saison d'été s'est terminée par la rencontre de 60 jeunes de nombreux pays d'Europe à l'occasion de la 4ème Rencontre Franco-Allemande. Les inscriptions ont été tardives pour le mois d'août et le nombre total des participants est sensiblement le même que les années précédentes. Mais le nombre de "nuitées" est inférieur. La durée moyenne des séjours est donc plus courte. La raison en est peut être que le nombre de séjours espérantistes est de plus en plus grand et aussi que les espérantistes, comme les autres, désirent partager leurs vacances en plusieurs activités. Le calendrier des stages 1987 tient compte de cet aspect. Par contre une innovation a été très bien accueillie: la "boutique". Elle a été le lieu de réunion de la plupart des stagiaires, lieu de détente également.Un certain nombre de soirées s'y sont déroulées.

Le bilan financier fait ressortir des rentrées "séjour" et "inscriptions" en baisse. Par contre les différentes recettes annexes sont en hausse assez nette, grâce en partie a l'activité de la "boutique". Le nombre de parts sociales souscrites a doublé. Les dépenses du chapitre "alimentation" ont baissé en raison du nombre un peu inférieur de nuitées mais aussi grâce à une plus grande rigueur dans le choix des produits et des fournisseurs. Cette année les dépenses "salaire jardinier" ont été réduites. Le Service Librairie a bien fonctionné. Les stocks se révèlent parfois insuffisants mais il est difficile d'immobiliser les sommes nécessaires qui seraient très importantes.

Le programme 1987 a paru dans le précédent numéro. Un programme plus détaillé est à la disposition de tous. L'administration sera assurée par Clara et Ivo Durwael, Janine Vincent, Renée Lenel, Luce, Nicole, Dominique et Pierre Babin. Les tarifs varieront peu et le droit d'inscription sera sans changement.

Des contacts ont été pris avec la MAIF pour contracter une assurance qui couvre tous les risques, y compris ceux encourus par les responsables et le personnel, bénévole ou non. Il est question de reveiller de son sommeil l'Association Culturelle du Château de Grésillon qui pourrait prendre en charge l'organisation de stages. Un travail à mi-temps sera proposé au bûcheron actuel et , si une bonne occasion se présente, un petit tracteur avec remorque sera acheté. Enfin le CA remercie M. Watier qui se propose de donner à Grésillon un beau meuble-bibliothèque.

La séance est levée à 17 heures.

Le secrétaire: Guy Dairon

Le Conseil d'Administration a également décidé que, désormais, les responsables de cours devraient posséder au moins l'Atesto pri Kapableco. En ce qui concerne les non-francophones, le choix se fera selon les renseignements obtenus.

KUNVENO DE LA KOMITATO 19/10/86

La prezidanto prezentas la staĝojn okazintajn en 1986. Printempe, la Infan-Renkonto grupigis 40 personojn el kiuj nur 20 infanojn. La malsamaj datoj de la ferio-tempo en la diversaj landoj multe ĝenas la venon de alilandaj infanoj, ĉefe ĉi-jare. Samtempe okazis dum tri tagoj, la Pedagogia Seminario organizita de UFE. La dua periodo (junio) estis pli vizitata ol la antaŭajn jarojn kun 40 ĉeestantoj. Notinde estas, ke 65% de la ĉeestantaro ne estis francoj. Dum la unuaj tri semajnoj de julio 79 personoj vizitis la Esperanto-Domon sed nur parto restadis dum la tuta staĝo. Bona etoso kvankam iuj diris, ke kelkaj prelegoj estis tro longaj. La kvara periodo grupigis 60 personojn kaj la kvina 40 dank'al malfruaj aliĝoj. La kurso pri informadiko akceptis nur malmultajn lernantojn. La somera "sezono" finiĝis kun la 4-a Franc-Germana Junulara Renkontiĝo, kiun ĉeestis 60 gejunuloj el diversaj eŭropaj landoj.

La nombro da partoprenantoj estis komparebla kun tiu de la antaŭaj jaroj, sed la nombro da tranoktadoj estis malpli granda. Do la meza longeco de la restadoj estis malpli longa. Ĉu pro la vojaĝemo de la esperantistoj ? Cu pro grandiĝanta nombro da esperantistaj aranĝoj kaj la deziro de multaj samideanoj viziti plurajn el tiuj aranĝoj samjare ? Sed initiato estis tre favore akceptata: "la butiko". Ŝajnas, ke mankis tia loko, kie oni povis ripozi te- aŭ kaf-trinkante Plurfoje la vesperaj aranĝoj okazis en la "butiko".

La provizora financa raporto montris, ke malaltiĝis la aliĝkotizoj kaj la restadenspezoj. Sed la "kromaj" enspezoj altiĝis parte dank'al la butiko. Ankaŭ la ĉapitro "akcioj" ampleksiĝis. Aliflanke la raporto reliefigis la mal-kreskon de la elspezoj pri nutraĵoj ne nur pro la malpli granda nombro da ĉeestantoj sed ankaŭ pro pli atenta elekto de la aĉetaĵoj kaj de la vendejoj. Ankaŭ la elspezoj pri la parkoprizorgado malaltiĝis. La Libro-Servo bone funkciis sed montriĝas , ke la stoko ne estas sufiĉe ampleksa. Ne facile solvebla problemo ĉar granda stoko de libroj postulus la "glaciigon" de granda kapitalo.

La kalendaro de la aranĝoj por 1987 aperis en la antaŭa numero de la revuo. Pli detala programo estas havebla jam de la komenco de novembro. La administraj deĵorantoj estos: Klara kaj Ivo Durwael, Janine Vincent, Renée Lenel, Luce, Nicole, Dominique kaj Pierre Babin. La Komitato decidas, ke la franclingvaj kurs-gvidantoj devos posedi almenaŭ la Ateston pri Kapableco. La eksterlandanoj devos esti rekomenditaj de konataj amikoj.

La "Kultura Asocio de Gresillon", kies celo estas la organizado de staĝoj dormas jam de longe. Ĝi vekiĝos okaze de la venonta Ĝenerala Kunveno en aprilo. La komitato aprobas la principon de kontrakto kun alia asekur-kompanio; ankaŭ la proponon al la parko-prizorganto de duon-tempa regula laboro. Se prezentiĝas favora prezo por aĉetado de malgranda , ne nova , traktoro ,realiĝos la akiro de tiu materialo. Ankoraŭ ne alvenis la antaŭfakturo pri refaro de la verando.

****

LIBRO-SERVO

Jen la jarfino, tre taŭga donactempo. Por plezurigi viajn ge-nepojn, korespondantojn, lernantojn, k.a., grandkvante disdonu la ĉarman libreton de Per-Jakez Helias " KIEL BRETONO IĜIS REĜO DE ANGLUJO ", tradukita de nia amiko F. Le Magadure. Ĝi kostas nur 15 F. kaj estas bele ilustrita de la junaj esperantistoj de Hennebont.

Mendu ĝin ĉe S-ino J. Vincent B.P. 54, 49150 BAUGE Tel. 41 89 29 47. Vi pagos nur post ricevo de la fakturo. Petu ankaŭ la katalogon de la haveblaj libroj, novaj kaj malnovaj.

NIA KONKURSO

Jen la lasta serio de tiu konkurso. Bonvolu sendi la respondojn antaŭ la 15-a de februaro 1987. Se vi ankoraŭ ne sendis la antaŭajn tri vi rajtas nun sendi la tuton. La gajnintoj ricevos siajn premiojn fine de marto. Solvoj kaj rezultoj aperos en la unua numero de Kulturaj Kajeroj 1987.



KVARA SERIO

1 — Jen la titoloj de kvin konataj verkoj. Trovu la mankantajn vokalojn. Donu la nomojn de la aŭtoroj.

L KJ N

SR KMP GRNT

RGLS

PRNS GVDLBR

KM, L FL DL GNGL

2 — Respondu la subajn demandojn (la respondoj troviĝas en tiu ĉi numero de la revuo) :

— Kial Etienne DOLLET estas konata ?

— Kiu estis la rolo de la megalitaj triboj en Azio ?

— Kio estas la « korektada periodo » en la infanaĝo ?

— Kial kokoj staras sur iuj francaj preĝejoj ?

— Kion oni nomas « deĉifro de palimpsestoj » ?

3 — Jen kvin asertoj. Kiuj estas veraj, kiuj mensogaj ?

— Victor Hodler mortis en 1920, kvindekjaraĝa.

— En « Angoroj » aktoris Raymond Schwartz kaj Gaston Waringhien.


— « Don Quijote de la Mancha » estis tradukita esperanten de Juan Regulo-Perez.

— SFPE signifis Societo Franca por la Propagando de Esperanto.

— La Akademio de Esperanto estis fondita okaze de la 4-a U.K. en 1910.

4 — En la suba teksto enŝoviĝis kvin eraroj. Korektu ilin.

Jam dum la unua mondmilito Hodler antaŭvidis plian kreskon de kolektivistaj tendencoj en la postmilita mondo, pliakrigon de la klasbatalo kaj novan rolon de Esperanto en la formiĝo de estanta ordo internacia... La esperantistoj estu « la embrion de tiuj elitoj », kiuj, super la naciaj ruinoj konstruu novan internacian domon. « Nacia libereco, demokratia regado, internacia statligo » estas, laŭ li, la postuloj de la nuntempo.



Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (220 aŭstr. ŝil.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (7.00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (80 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (60 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Aurorastraat, 4, 5631 KK EINDHOVEN, pĉk. 209721 (24 gld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Marmarvn 2A Oslo 11 (60 kr.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (65 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN